

**BENELUKSA KONGRESO  
&  
PAC-EVENTO**

**leper (Belgio)  
23-25 septembro**



## ENKONDUKE

Kara kongresano,

Koran bonvenon al nia evento en Ieper [prononcu Ipr’].  
Ni invitas vin konatiĝi ne nur unu kun la alia sed ankaŭ kun la urbo Ieper.

La urbo havas riĉan, kvankvam ne ĝojplenan pasinteco. Ieper ne forgesis sian teruran sorton dum la Unua Mondmilito, kies spuroj, ofte en la formo de milittombejoj, ankoraŭ ĉie videblas en la urbo kaj ĉirkaŭaĵo. Ankaŭ la impona Menenpoort, honore al la pereintoj de la brita ŝtatkomuno, ne povas ne esti rimarkita.

La urbo flegas sian heredaĵon respektplene sed ne nur sian materian heredaĵon, ankaŭ sian spiritan heredaĵon. La urbo titoligis sin pacurbo kaj konkretigas tion diversmaniere, ekzemple per ĝia vicprezidanteco de Mayors for Peace [Urbestroj por Paco], ĝia trijara Pacpremio kaj ĝia ĉiujara festado de la Internacia Tago de la Paco.

Ĉi-jare ni kaptis (kaj ricevis) la okazon ligi Esperanton al la ĉi-jara Paco-evento. Nia lingvo ricevos apartan lokon dum la evento forme de informsesio. Ni vere esperas ke tiu sesio estos serioza kontribuo al la kono kaj la bildo pri Esperanto. Aliflanke via ĉeesto helpas montri ke Esperanto estas pli ol bela ideo.

Ni invitas vin ĝui la kongreson kaj la pac-eventon!

La Loka Kongresa Komitato  
*Piet Glorieux*  
*An Olijslagers*  
*Nicky Janssen*

## LA PACO-EVENTO

La ideo pri organizado de la Esperanto-pacevento ekestis post kiam mi instigis mian ĥoruson Vamos Pra Lutar partopreni festivalo de ĥorusoj por la paco. Ĝi estas organizita de la Ligokomitato de UNESKO en kiu François Lo Jacomo reprezentas UEA-n. La festivalo postulas ke la partoprenantaj ĥorusoj organizu lokan eventon.

La urbo Ieper sugestis organizi tion kadre de la ĉiujara festado de la Internacia Tago de la Paco. Ili ankaŭ sugestis antaŭvidi kiel unu el la programeroj informesion sub la titolo "Esperanto: ĉu lingvo de paco?". Kompreneble mi ĝoje akceptis tion. La organizado de koincida beneluksa kongreso estis logika sekvo.

Notu ke la informesio celas precipe ne-esperantistojn kaj do estos grandparte en la nederlanda. Sed vi estas tre bonvena se nur por pligrandigi la publikon sed ankaŭ poste por distendi la flagon.

### PROGRAMO:

Vleeshuis (angulo de Boterstraat kaj Boomgaardstraat)

14h-15h: **Informsesio parto 1**

Enkonduko pri la temo fare de prof.dr. Marc van Oostendorp.

Intervjuo de s-ino Taeko Osioka, pacaganto el Hiroŝimo

Kanto de s-ro Abel Massiala el Angolo

Poemdeklamo de s-ino Anne Brabant

15h-16h **Informsesio parto 2**

Atelieroj en diversaj lingvoj

dum kiu ni klarigas la bazon de Esperanto

Biking Bar (Menenstraat 15)

16h-17h **Regalado** de la esperantistoj

Granda Placo

17h **Disetendado de la plej granda pacflago**

(se ne pluvos)

Sankta Jakobo-preĝejo (Gezelleplein)

18h **Packconcerto** kun i.a. du kantoj en Esperanto + trinkaĵo

Menenpordego

19h50 **Konkluda kanto** antaŭ la **Last Post**

Promenado/veturado al kongresjo De Iep por la vespermanĝo

## PRELEGOJ

### ESPERANTISTOJ KAJ LA GRANDA MILITO

fare de dr. Javier Alcalde (°1978, Katalunio-Hispanio)

D-ro Alcalde naskiĝis en Barcelono en 1978, doktoriĝis pri sociaj kaj politikaj sciencoj en Florenco en 2009 kaj eklernis Esperanton en 2011. Profesie li esploris pri pluraj sociaj movadoj, interalie la pacifisma movado kaj la Esperanto-movado. En 2018 li publikigiĝis la kolektiva libro “Antaŭ unu jarcento. La granda milito kaj Esperanto (SAT-EFK)”, kunordigita de José Salguero kaj mi.

En la prelego li pritraktos plurajn erojn kiuj aperas en tiu libro, sed ankaŭ aliajn pri kiuj li esploris poste.

Li malkovris Esperanton dum kurso de la franca lingvo en 2006 sed eklernis ĝin nur en 2011. En 2019 li eniris la Akademion de Esperanto, kie mi direktoras la komisionon pri socia historio de Esperanto.

D-ro Alcalde estas universitata docento kaj esploristo. Li fakas pri internaciaj rilatoj. Dum sep jaroj li laboris kiel esploristo en instituto pri pacaj studoj. En tiu kadro en 2014 li kunordigis revuan numeron pri pacifismajn klopodojn en 1914-18. Plurfoje (kaj plurlingve) li prelegis pri tiu temo.

### PACISTOJ KIUJ ESTIS ESPERANTISTOJ ANTAU LA UNUA MONDMILITO


fare de s-ro Bernard-Régis Larue (°1963, Belgio)

Esperanto iom entenas la idealon de Paco, jam de sia origino. Inverse, pluraj gravaj pacistoj antaŭ la Unua Mondmilito, estis esperantistoj dum aliaj subtenis Esperanton, sed sen lerni do sen praktiki nian lingvon. Li prezentos al vi tiujn gravajn homojn, ofte tro forgesitajn.

S-ro Larue estas esperantisto de 1980, origine pro intereso al komunikado kaj al internaciismo. Nun plentempe sperantoparolanto: ĝi estas la lingvo de nia paro. Post multaj universitataj studoj, ĉefe ĉirkaŭ matematiko au informatiko, li laboras kiel projektestro en asecura kompanio. (daŭrigota en pĝ. 8)

Kongr esejo  
De le p

Senpa ga  
par kejo  
ma la ntaū  
stacido mo



Stacido mo

Bikh g Bar

Me nenpo rdeg o



- 1 Nazarethstraat
- 2 St-Janshospitaal
- 3 Beurzesstraat
- 4 St-Christoffelstraat
- 5 Paradijstraat
- 6 St-Catharinastraat
- 7 Maagdenstraat
- 8 Oude Koningstraat
- 9 Blindeliedenstraat
- 10 Kiekenmarkt
- 11 Burchstraat
- 12 Moskoustraat

Sankta Jakob rege jo

Vleeshuis

(sekvo de pĝ. 5)

Liaj fosadoj en la historio do ne rilatas al lia profesio. Sed jam komence de la okdekaj jaroj li interesiĝis pri Henri La Fontaine kaj lia Mundaneum.

## **MIA PACO-AGADO (FILMO)**

Fare de s-ro Taeko Osioka (°1948, Japanio)

S-ino Osioka estas emerita bazlerneja instruistino, kiuj naskiĝis kaj ekkreskis en Hiroŝimo, urbo kiu terure suferis pro la atombomboj tuj je la fino de la Dua Mondmilito.

De jardekoj ŝi aktivis por Esperanto kaj paco. Ŝi subtenas la agadon de Japana Esperanto-Instituto (JEI) kaj plurfoje vojaĝis tra la mondo kiel parto de japana pacdelegitaro por ekspozicii pri Hiroŝimo kun la celo ne forgesigi la atombombadon kaj pledi por malarmo de atombomboj. Kun sia edzo (Osioka Moritaka, ankaŭ aktivulo de JEI) ŝi faris el sia hejmo la Hiroŝiman Esperanto-Centron. Pli ol 100 samideanoj de 30 landoj jam gastis en ilia hejmo, foje eĉ 11 gastoj samtempe.

Ppst ŝia emeritiĝo en 2006 ŝi ekvolontulis kiel ĉiĉeronino en la hiroŝima Paca Parko, kie ŝi gvidas la turistojn kaj vizitantojn kaj klarigas pri la eventoj de la sesa de aŭgusto 1945. Ŝi ludas gravan rolon en la pacmovado en Hiroŝimo per kolekto de subskriboj por subteni malarmadon de nukleaj armiloj: de vizitantoj ŝi kolektas la subskribojn kaj sukcesis arigi 111 000 subskribojn ĝis nun.

## **UZADO DE KEMIAJ ARMILOJ DUM LA UNUA MONDMILITO**

Fare de d-ro Yannick Vercammen (°1984, Belgio)

Filo de karmemora eks-prezidanto de Flandra Esperantoligo Ivo Vercammen kaj Nicky Janssen. La tuta familio lernis Esperanton en 2004.

Laŭ eduko doktoro pri kemio. Profesie sekciestro en entrepreno pri akvotraktado.



## KONCERTO

de **Abel Massiala** (°1981, Angolo),  
kun poemdeklamado de **Heidi Goes** (°1978, Belgio)

Abel Massiala kantos en diversaj lingvoj, akompananta sin per gitaro. Li kantos memverkitajn kantojn kaj kantojn de aliaj kantistoj. Heidi Goes deklamos poemojn de la unua prezidento de Angolo, Agostinho Neto, tradukitaj en Esperanto. Li esperas ĝojigi kaj dancigi vin per sia muziko.

Abel naskiĝis en Kabindo, eksklava provinco de Angolo inter Kongo Kinshasa kaj Kongo Brazzaville. Profesie li estas instruisto, sed li nuntempe vivas en Belgio kaj lernas la nederlandan kaj Esperanton.

Heidi Goes verkis pri la historio de la Esperanto-movado en Afriko kaj en Indonezio, Singapuro kaj Malajzio kaj instruis Esperanton en diversaj landoj, precipe Indonezio, Orienta Timoro kaj Angolo. En 2018 ŝi ricevis la premion Deguĉi pro sia eduka kaj historia laboro ene de la Esperanto-movado. Ĉi-jare ŝi doktoriĝis pri la konga lingvaro, kun speciala atento por la lingvaj variantoj parolataj en Kabindo, Angolo. Profesie ŝi laboras interalie en rifuĝcentro por virinoj en Bruselo kaj ĉe la departemento de afrikaj lingvoj de la Universitato de Gento.

## KURSO POR KOMENCINTOJ

Fare de s-ino Kristin Tytgat (Belgio) kaj s-ro Gunter Neue (Germanio)

## ATELIEROJ

- **Citroludado** gvidata de s-ro Johan Van Eenoo (Belgio)  
Ĉu vi iam ludis muzikon? Ĉu jes, ĉu ne, jen la fretocitro! Vera popolmuzikinstrumento kun kordoj, kiu ne postulas muzikkonon, sed tamen permesas produkti belan, ĉiuspecan muzikon.
- **Origamio**, la japana arto pri paperfaldado  
gvidata de Emilio Vanderfeesten (Belgio), helpe de Elke Lies (Germanio) kaj An Olijslagers (Belgio)
- **Ŝtofofarbado**  
gvidata de Nicky Janssen (Belgio) kaj Valère Doumont (Belgio)
- **Konfliktsolvado**, gvidata de Mireille Grosjean (Svislando)  
Praktikaj ekzercoj kaj esploro de diversaj emocioj, sentoj kaj vojoj gvidos nin al efika agado cele al konfliktsolvado.

## LIBROSERVO

Kaptu la okazon provizi vin per la libroj kiujn vi ĉiam volis aĉeti...

## PROGRAMO VENDREDO & SABATO

<b>Vendredo</b>	17h00-19h	Akcepto (E)
	19h-20h15	Vespermanĝo
	20h30-21h	Interkona ludo (M) (An)
	21h-22h	Koncerto: Abel kantas & Heidi deklamas (M)
<b>Sabato</b>	7h30-8h45	Matenmanĝo
	9h-10h30	Ateliero citroludado (G) - (Johan) Esperantistoj ĉirkaŭ la 1a MM (A) - (Javier)
	10h30-11h	Kurso por komencintoj (M) (Kristin) Kafpaŭzo (M)
	11h-12h30	Ateliero origamio (G) (Emiel, Elke, An) Pacifistoj antaŭ la unua Mondmilito (A) (Bernard-Régis) Kurso por komencintoj (M) (Gunter)
	12h30-13h15	Tagmanĝo
	13h15-15h15	Libroservo (A)
	14h-16h	Partopreno al informsesio por vizitantoj, vidu pĝ. 4 aŭ Libera promeno/muzeovizitado*
	16h15-17h	Regalado per trinkaĵo/frandaĵo (en Biking Bar, vidu pĝ. 4)
	17h-18h	Disetendado de la plej granda pacflago
	18h-19h15	Packoncerto, vidu pĝ. 4
	19h15-20h10	Postkoncerta regalado per trinkaĵo & ĉeestado Last Post
	20h10-20h45	promenado/veturado al kongresejo De Iep por vespermanĝo

## PROGRAMO DIMANĈO

Dimanĉo 25/9	7h30-8h45	<b>Matenmanĝo</b> Prelego: mia pac-agado en Hiroŝimo (A) (Osioka Taeko) Ateliero: Ŝtofofarbado (G) (Nicky, Valer)
	9h-10h30	Kurso por komencintoj (M) (Kristin)
	10h30-11h	Kafpaŭzo Ateliero: konfliktoŝtudo (G) (Mireille Grosjean) Prelego: kemiaj armiloj dum la Unua Mondmilito (A) (Yannick Vercammen)
	11h-12h30	Kurso por komencintoj (M) (Kristin)
	12h30-13h15	Tagmanĝo Ekskurso* perpieda (akompananto: Piet, Paul) Ekskurso* perbicikla
	14h	(akompananto: Eddy, Anl)

(\*) ne inkludita en la baza kotizo de € 120

### LEGENDO DE LA SALONO EN LA KONGRESEJO

E	Enirejo je etaĝo 1
M	Manĝejo je etaĝo 1
A	Aŭdvida salono je etaĝo 0
G	Gufujo (bar) je etaĝo 0

## TURISMAJ VIZITINDAĴOJ en IEPER

**La remparoparko** – senpage, kompreneble!

Vidu la broŝuron “La itinero de la fortikaĵoj” kiun vi ricevis.

**Muzeo “In Flanders Fields”** - [www.inflandersfields.be](http://www.inflandersfields.be) –  
baza kotizo € 10 (kombine kun Yper-Mizeo: € 13)

Fama, premiita muzeo kiu rakontas la historion de la Unua Mondmilito en la Okcident-Flandra Frontregiono. Per la plej moderna teĥnologio (tuŝekranoj, filmprojekciado, sonefikoj) ĝi allogas eĉ ne muzeemanojn.

**Yper-Muzeo** - [www.ypermuseum.be](http://www.ypermuseum.be) –

baza kotizo: € 7 ((kombine kun muzeo “En Flanders Fields”: € 13)

Freŝdate tute renovigita muzeo pri la historio de la urbo.

Tre interaga kaj infanafbla. Vi tre ŝatos la humurplenan manieron per kiu oni prezentas ĉion.

**Menen-pordego** – senpage

La Menen-pordego estis militomemorigilo, dediĉita al la britaj soldatoj kaj soldatoj de la Ŝtatkomunumo, honore la la soldatoj mortigitaj en la ipra frontregiono dum la Unua Mondmilito kaj kies tomboj estas nekonataj.

## UTILAJ INFORMOJ

**Turisma Oficejo** – en la Draphalo [Lakenhallen], Grote Markt  
tel. +32 (0)57 239 220

**Telefonnumeroj LKK-anoj**

Piet +32 (0)472 257 918

An +31 6 14608280

Nicky +32 (0)488 35 22 02

